




# NORDA PRISMO



np

**I 1992**

Juan Antonio Giménez

Pl. Pintor Segrelles, 1-B-19.º

46007 - VALENCIA

# NORDA PRISMO

**NUMERO**

**1/1992**

# Okaze de renaskiĝo

Gazetoj estas kiel homoj. Ankaŭ ili havas epokojn de naskiĝo, kresko, stagnado. Epokojn de forta memfido kaj senproblema antaŭeniro, epokojn de malsukceso, krizoj, reorientiĝo. Tamen ili havas ankaŭ unu eron pli. Malsame kiel homo, gazeto kapablas renaskiĝi, rekomenci brilan vivon, sendepende de la agoj de la malnova epoko.

Nun ni vivas tian renaskiĝon. La nomo de tiu-ĉi gazeto estas jam malnova, unuan fojon ĝi aperis en 1954. Nun la stafeton portas novaj fortoj. Mi mem naskiĝis nur unu jaron antaŭ la morto de la fondinto de Norda Prismo Ferenc Szilágyi.

\*\*\*

Nian sloganon, subtitolon, eblus elekti el vasta gamo de esperantismoj. Unu tia povus esti "por esperantaj kulturo kaj lingvo". Per ĝi ni povus esprimi nian kunligiĝon al la esperanta lingvo, ne simple al Lingvo Internacia aŭ Esperanto, sed al esperanta esperanto, kiu elĉerpas el la riĉo kaj la tradicio de la komunuza lingvo, evoluigas kaj defendas ĝin, utiligas kaj uzas ĝin en la esperanta kulturo, ĉu mi dirus eĉ "esperantisma" kulturo. Kulturo, kiu evoluas sendepende, sed en kunligoj kun aliaj kulturoj, sed en kunligoj konservas kaj prezentas ankaŭ sian propran ecaron.

Kiel sloganon ni povus uzi ankaŭ "nordia, kultura revuo en Esperanto". Per ĝi ni esprimus, ke temas pri kultura revuo, kiu uzas la lingvon Esperanto. Ni ne ligiĝas sole al la esperanta kulturo, sed ankaŭ al la kulturoj de nordaj landoj (tre vaste, inkluzive la landojn de la Balta maro kaj de eŭropa, orient-azia kaj amerika nordo). La lingvo, kiun ni uzas, estas esperanto, verŝajne la sola elekto por kultura revuo, kiu volas kovri tiom vastan kaj malsimilan teritorion.

Ni povus ankaŭ elekti "Kunligilo de esperanta Nordo", per tio ni esprimus nian kunligon al la esperanta movado, tia kia ĝi ekzistas en la landoj de Baltio kaj Nordio. El ĝi verŝajne venas niaj plej multaj skribantoj kaj legantoj, kvankam la temoj de la gazeto ne estas ligitaj nur al tiuj landoj.

\*\*\*

Nia revuo estas internacia. Tio kaŭzas al la skribantoj kelkajn postulojn. Unue esprimi sin internacie. Tio signifas konscii pri tio, kio

# Konsiloj por skribantoj

Tajpu viajn skribaĵojn, manskribu ilin klare. Se vi uzas maloftan (en komunuza lingvo) esprimon aŭ vorton ne troveblan en Plena Ilustrita Vortaro, aldonu fine de la skribaĵo klarigon. Ankaŭ se vi konscie uzas ne-oftan frazstrukturon aŭ rompas gramatikan regulon pro stila kialo, informu la redaktoron (por ke li ne miskorektu vian tekston). Redakcio faros necesajn lingvajn korektojn, sed volas ankaŭ konservi la originalan stilon kaj esprim-manieron de la verkinto.

En beletraj tekstoj redaktado de tekstoj estas limigita al minimumo kaj pri la korektoj ni konsentos kun la verkinto. Normale la verkinto mem respondecu pri la senerareco de sia lingvouzo.

Se en via artikolo aperas nomoj (personaj aŭ geografiaj), kiuj ne estas internacie konataj, indas aldoni mallongan klarigon. Se vi esperantigas nomon, aldonu la originalan nacilingvan formon. Tio speciale gravas, se temas pri transskribo de nomoj el alia alfabeto (ekz. rusa). Por la redaktoro estas bonvenaj ankaŭ nacilingvaj klarigoj en la finna, sveda, angla, rusa, germana, franca, estona kaj hispana lingvoj.

Bonvenaj estas ankaŭ desegnaĵoj kaj fotoj, prefere blanknigraj.

Artikoloj kun citaĵoj el aliaj verkoj havu font-indikojn. Tradukantoj prefere mem aranĝu la permeson de la originala verkisto pri la aperigo de esperanta traduko en Norda Prismo. Pri malnovaj verkoj kaj ne-artaĵoj, ekz. gazetartikoloj, tio ne necesas. La originala verkinto de tradukaĵo ricevos ekzemplero(j)n de la koncerna numero. Pri alia rekompenco konsentu kun la eldonanto Oy Mendoservo Ak.

Pri recenzitaj libroj aldonu sekvajn informojn: nomo de la libro kaj verkinto, eldonanto, eldonjaro kaj -loko, paĝkvanto, prezo(j).

Se vi sentas vin kapabla verki pri iuj temoj laŭ peto, ekz. revenci librojn, informu la redaktoron tiel, ke li scias peti de vi ion laŭbezone.

La materialon sendu al Jukka Pietiläinen, Puutarhakatu 12 B 18, 40200 Jyväskylä, Finnlando (escepte la dua numero).

La duan numeron redaktos Jaan Ojalo, Narva mnt. 9-5, 200001 Tallinn, Estonio. Limdato estas 25-a de februaro 1992.

La dua numero aperos en la unua trimestro de 1992 kaj ia du lastaj de la unua jarkolekto somere kaj aŭtune 1992.

# Vortoj de la eldonisto

Jam longe stagnis la aperado de Norda Prismo. Ĝia lasta eldonanto estis Fondumo Esperanto, kiu antaŭ kelkaj jaroj vendis sian komercan agadon al Mendoservo.

Bone sciante, ke dum la unuaj jaroj Norda Prismo estos nura ŝarĝo al la eldonisto, ni tamen decidis renaski ĝin. La nova NP estas kaj estos malsimila al la antaŭa. Por la enhavo ni fiksas tre vastajn kadrojn, tiel la ĉefredaktoro, kune kun la redaktoroj kaj helpantoj, havas eblecon propraguste fari interesan kaj varian revuon. Profesie li havas kapablon realigi tion.

Verŝajne okazos etaj ŝanĝoj en la teknika nivelo ĉe la unuaj numeroj. Tion kaŭzas ebleco uzi la servojn de diversaj esperantaj kompostejoj kaj presejoj en la proksimaj novkapitalismaj landoj. Ĉi tiuj aranĝoj helpas al ni teni la elspezojn elteneblajn dum la periodo, kiam la abonantaro ankoraŭ ne estas sufiĉa.

**Lasse Kivistö,  
direktoro de Oy Mendoservo AK**

Pro la lastamomenta alveno de la suba letero/artikolo ni povas ĉi-foje publikigi nur la komencon. En la sekva numero ni revenos al la afero. Tiam plie komencos publika diskuto pri la nomo, ĉu konservi ĝin aŭ ŝanĝi al ...:

Kara amiko,

Kun ĝojo mi donas al via eldonejo, nome de LF-koop, la rajton uzi la titolon "Norda Prismo" por la nova kultura periodaĵo, kiun vi planas lanĉi. Je tiu rajto, kiun ni akiris jam en 1975 de la tiama eldonisto, Vilho Setälä, ni rezignas volonte, ĉar la kooperativon de Literatura Foiro ne animas la deziro havi ekskluzivecon en la tereno de esperanto-gazetaro: nia societo ne havas monopolajn celojn, male ĝi bedaŭras la ĵusan ĉeson de "Hungara Vivo", kaj ĝi kredas ke la multigo de revuoj alportas sanan konkurencon, kiu akcelas la kvaliton. Grandan sukceson al via iniciato.

**Giorgio Silfer, prezidanto**

estas nacia en ilia pensmaniero kaj provi esprimi ĝin al legantoj, kiuj ne konas tiun nacian kulturon. Tamen ian kulturigon oni povas postuli ankaŭ de leganto, sed ekz. en kulturo, kiu ne konas neĝon, oni ne povas postuli konon de ĝiaj ecoj.

Nia gazeto uzas la lingvon esperanto en sia komunuza formo, en tia formo, kiun la plimulto el lingvouzantoj uzas. Tro fremdaj vortoj kaj esprimmanieroj (kiuj estas ne facile kompreneblaj) postulas klarigon kaj pensadon ĉe skribanto, kiel li/ŝi povus pli klare kaj internacie sin esprimi. Per internacieco ni ne celas inter-eŭropecon, inter-blankulecon aŭ inter-virblankulecon. Ni emfazas tutplanedan internaciecon, plej eble sendependan de raciaj, naciaj, religiaj, seksaj kaj kulturaj diferencoj, malfacilan, sed strebindan.

\*\*\*

Se vi iam havis en viaj manoj ekzempleron de la antaŭa Norda Prismo, vi eble komparas la nunan al la tiama. Tion mi permesas, kvankam emfaze mi volas rekomenci el plejparte nova bazo. Kiel redaktoro de kultura gazeto mi estas pli redaktoro ol kulturisto, t.e. verkisto aŭ profesiulo de kulturo. Eble pro tio mi povus doni ion freŝan al la revuo kaj kunigi ĝin al la publiko de literaturo, al ĝia uzantaro, al kiu ankaŭ mi mem apartenas.

Ek al laboro! Espereble sufiĉas fortoj kaj intereso, same ĉe vi kaj ĉe mi.

### **Jukka Pietiläinen**

En tiu ĉi numero la enhavo ne estas tiom varia, almenaŭ el geografia vidpunkto, kiel mi esperus. Bonvenaj estas materialoj el Nordio, pri Nordio (inkluzive la regionon de Balta Maro), aŭ nordo (ĉio de Skotlando, tra Siberio, Japanio kaj Ĉinio ĝis Norda Ameriko), sed ankaŭ alilokaj kaj –temaj tekstoj taŭgas. Ankaŭ paĝkvanton eblas grandigi, se venos interesa pli longa materialo aŭ se nia gazeto atingos sufiĉan kvanton da legantoj. Al la legantoj mi havas peton. Skribu vian opinion pri la enhavo, tiel, en venontaj numeroj, vi ricevos ĝuste tion, kion vi volas. Ĉiaj rimarkoj estas bonvenaj.

antologioj. Liajn versaĵojn kaj rakontojn karakterizas flua lingvaĵo, bona kono de homoj kaj la naturo, pensklareco, rimriĉeco. Ofte li versis en la hejmloka dialekto. La estonlingvan poezion de Adamson karakterizas Hilda Dresen jene: "El lia spontanee verkita poezio alblovos nin la humodora freŝeco, belsoneco kaj kvankam en lia lasttempa poezio dominas mortopensoj, ĝi ankaŭ estas riĉa je la aparte ĉarma humuro" ("Vesperkanto p. 10).

Kun Esperanto Hendrik Adamson konatiĝis en 1929 kaj jam en 1930 li komencis uzi la internacian lingvon en verkado. En "Literatura Mondo" aperis liaj versaĵoj ekde 1932. En la literaturhistorie grava "Dek du poetoj" (1934) Hendrik Adamson estas reprezentita per 11 versaĵoj. La saman jaron "Literatura Mondo" eldonis ankaŭ lian rakonton "Auli" (la dua eldono de E. Iltis, Saarbrücken, 1983).

La 30-aj jaroj, kiam estas verkitaj la versaĵoj de Adamson, estis la periodo, kiam la esperanta poezio atingis artiliteraturan nivelon. Tion demonstras ankaŭ poezio de Adamson. Tio estas diversenhava, sed dense ligita al lia hejmlando kaj -loko. Hilda Dresen karakterizas: "Se oni komparas la esperantajn poemojn (de H. A.) kun la estonaj, oni devas konstati, ke en la esperantaj estas troveblaj relative pli multe la petolaj rimoj kaj ĝojaj sonoj ol en la estonlingvaj. La poeto volas kanti ĝojokantojn, penante kaŝi, ke doloro brulas en lia brusto ("Vesperkanto" p. 10).

El la 150 esperantlingvaj versaĵoj de Hendrik Adamson 80 aperis en la kolekto "Vesperkanto" ("Stafeto", 1967), sporade en prilaboro de la redaktinto Kálmán Kalocsay. En periodaĵoj kaj antologioj ili aperis proksimume 80-foje.

La pli ol 50-jara tempopaso multon forviŝis ankaŭ en la historio de Esperanto-literaturo, multo arkaikiĝis kaj tedus nuntempan leganton. Tio ne koncernas la poezion de Hendrik Adamson, kio estas leginda kaj ĝuigas ankaŭ la nunan esperantistan generacion.

**Jaan Ojalo**

# Hendrik Adamson – 100



La jaro 1891 – kvaĵarojn post la apero de Esperanto – havas apartan gravecon en la historio de nia originala poezio kaj literaturo ĝenerale: tiun jaron naskiĝis kvin Esperanto-verkistoj – Kálmán Kalocsay (1891–1976), Julio Baghy (1891–1967), Georgo Deŝkin (1891–1967), Nikolao Hohlov (1891–1953) kaj estono Hendrik Adamson. La unuaj du estas veraj korifeoj, la aliaj tri restigis pli-malpli reliefajn ŝpurojn en sia epoko kaj nomon en la historio de la Esperanto-literaturo.

*Hendrik Adamson*

Hendrik Adamson naskiĝis la 6-an de oktobro

1891. Kiel filo de malriĉa vilaĝa tajloro-kabanulo li kun grandaj malfaciloj sukcesis atingi klerecon de popollerneja instruisto (1911–1927, 1941–1945), sed grava malsano ne ebligis al li daŭran laboron en lernejo. Dum la periodo 1928–1940 li loĝis kun la patrino en la fare de la patro konstruita dometo, ricevante malgrandan invalidan pension, kelkfoje ankaŭ honorarion, tiutempe ankaŭ malgrandan. Li mortis la 7-an de marto 1946. Lia tombo troviĝas en la hejmloka tombejo en Sud-Estonio (Helme).

Hendrik Adamson estas unuavice estona nacia poeto. Dum la periodo 1919 – 1990 aperis de li estonlingve sep versaĵaroj kaj 4 prozaj verkoj, versaĵoj kaj fragmentoj de prozaĵoj multfoje en periodaĵoj kaj



Du versaĵoj ne aperintaj en "Vesperkanto".

## IO MALMODERNA

Nia mondo tom plaĉa  
tom aĉa  
kaj malsaĝa;  
ni ĝin eble tre ne damnu,  
ĉar ne vidis ni pli bonan,  
pli valoran  
kaj bonmoran.  
Estu ĝi eĉ kia ajn  
gajn', malgajn',  
nin neniam trompu ŝajn', -  
nura trajn'  
ĉio ĉi por niaj fortoj;  
diferencas homaj sortoj  
lau feliĉ' kaj malfeliĉ',  
riĉ', malriĉ';  
superstiĉ'  
pensas, ke supera bono  
en juveloj aŭ en mono,  
ne divenas li, ke or'  
la plej pura nur en kor',  
en pacema,  
nelacema  
nobla peno de labor'.  
Jen marŝadas en ĉifonoj  
konsumitaj per tifonoj  
de malsato kaj de pest',  
jen protest'  
krieganta eĉ senvoĉe,  
minacanta senriproĉe  
al la ar' nenifarula  
de hompuloj, de homkuloj ...

## BIBLIOGRAFIO

### Verkoj:

"AULI". Rakonto pri knabeto. "Literatura Mondo" 1934, 86 p.  
E. Iltis, Saarbrücken, 1983, 90 p.

"VESPERKANTO". J. Regulo, La Laguna, 1967, 132 p.  
En periodaĵoj kaj antologioj 80 versaĵoj kaj rakontoj.

### Artikoloj pri H. Adamson:

Hilda Dresen: "Hendrik Adamson – poeto estona kaj Esperanto"  
"Informoj de EAE" 1935/165–166, p. 75.

Stellan Engholm: "Hendrik Adamson". "Malgranda Revuo"  
1946/3, p. 1–8.  
"La Espero" 1946/6, p. 54.

Hilda Dresen: "Hendrik Adamson".  
"Heroldo de Esperanto" 1966/16  
"Adamson kaj lia verko". Antaŭparolo al  
"Vesperkanto" p. 9–15

Jaan Ojalo: "Hendrik Adamson". "Esperanto" 1974/6 p. 110–111.  
"Amikeco" 1977/19, p. 21.

J. Ojalo, H. Dresen, H. Seppik: "Defende al Hendrik Adamson"  
"Esperanto" 1979/1, p. 8–9.

J. Ojalo: "Hendrik Adamson kaj lia verko".  
Postparolo al "Auli" 1983, p. 87–90.

### Recenzoj:

S. Engholm: "Auli". "Lingvo-Libro" 1935/1, p. 48–49.

M. S.: "Auli". "Informoj de EAE" 1938/1, p. 4.

Mario Sola: "Vesperkanto". "Heroldo de Esperanto" 1968/1

E. Lapenna: "Versa memorŝtono". "La Suda Stelo" 1968/2, p. 43.

W. Auld: "Testamento de unu atentinda poeto".  
"Esperanto" 1968/1, p. 7.

Nun disrompiĝis ĉina muro  
per granda homgent',  
Adamaj idoj ne diskuru,  
denove kune vi;  
vi enterigu sangajn lancojn  
kaj iru man' en man',  
al tio ĉi bonŝancon,  
pereon al malam'.

Sub verda stelo kaj standardo,  
ho filoj de l' homar',  
antaŭen kun obstin' kaj ardo,  
neniu povas bar'  
vin fortlimigi aŭ reteni  
de via nobla cel',  
do devas iam veni  
la tag' de bon' kaj bel'.

## REVOJ

Eble mia tag' alvenos,  
kiam kuŝas mi en tomb',  
miajn ostojn oni prenos,  
oferiĝos hekatomb'.

Oni sub marmoron metos  
la restaĵojn kun honor'  
kaj riproĉojn oni ĵetos,  
ke mi frue iris for.

La knabinoj belvestitaj  
eble kantos kun fervor'  
kaj ornamas ŝtonan liton  
epitaf' el brila or'.

.....

.....

*sed ...*

## **MARŜOKANTO**

*Antaŭen, verda la standardo,  
antaŭen, verda stel',  
en koroj esperantaj ardu  
dezir' je bon' kaj bel',  
antaŭen nun kun vigla paŝo  
en granda kur' de vet',  
ŝiriĝas maŝ' post maŝo  
la hommalama ret'.*

*Levinte manojn kun armiloj  
al frato iras frat'.  
Militbatalo tra jarmiloj,  
rezulte pest', malsat';  
alpuŝis homojn malkompreno  
al tiu vea sort',  
rikolton riĉan prenas  
de hommalam' la mort'.*

*Sed dum detruo kaj pereco  
ne ĉesis peni hom',  
ne mortis noblaj la ideoj  
pri paco kaj homam',  
nur mankis vera komprenilo,  
disiĝis la homar'  
kaj dronis pacaj filoj  
en hommalama mar'.*

diri: la estonoj, lernintaj paroli en la unua jardeko de la jarcento, parolas nun, en sia alta aĝo, iun alian lingvon, kiu tiutempe estintus malfacile komprenebla. La radikaleco de la estona lingvonovigo estas preskaŭ komparebla kun la kuraĝo de la kreado de Esperanto. Rimarkinda ĉiukaze estas tio, ke ambaŭ eksperimentoj sukcesis, nun oni parolas kaj la novigitan estonan lingvon kaj ankaŭ Esperanton.

La plej radikala noviganto de la estona lingvo estis Johannes Aavik (1880–1973). Li estis romana filologo (li finis la universitaton de Helsinki en 1910), lingvoinstruisto, ĵurnalisto, tre diversflanka literatoro, universitata lektoro kaj gvida oficisto de la ministerio de edukado. La plej gravaj liaj lingvonovigaj verkoj estas: la manifesteca "Ekstremaj ebloj de la lingvonovigo" (1924) kaj la resuma "Lernolibro kaj gramatiko de la ĝusta estona lingvo" (1936). Oni povas diri, ke lia agado tuŝis ĉiujn nivelojn de la estona lingvo kun la celo krei lingvon respondan al la postuloj de alta kulturo kaj celo certe ankaŭ belsonan. Precipe tipa al li oni konsideras lian estetikan rilaton al sia misio.

Certe la agado de Aavik postlasis la plej profundajn postsignojn en la vortrezoro de la estona lingvo. Li komencis per rekomendo de centoj da pruntvortoj el la parenca finna lingvo, li revivigis vortojn de la malnova skriba lingvo kaj serĉis aldonojn el la dialektoj, sed okaze de tio li ne estis puristo kaj ekuzis ankaŭ novajn fremdvortojn; sed kio estas tute eksterordinara: li konsideris eblon krei vortojn – tiel diri – el nenio, surbaze de liberaj sonasociacioj. Tia doktrino estis alprenita en neniu lingvo kaj certe tio influas paradokse ankaŭ hodiaŭ. Sed la vortkreado de Aavik evidentiĝis fruktodona, dudeko da liaj artekreitaj vortoj estas vaste konataj kaj ĉie uzataj, ekzemple "veenma" (konvinki), "relv" (armilo), "roim" (krimo), "mõrv" (murdo), "aldis olema" (samopinii) kaj aliaj. Lian metodon uzis ankaŭ aliaj lingvistoj ĝis la lastaj jardekoj, ekzemple ni nomu "hõivama (okupi), "vandel" (eburo) kaj aliaj.

Aavik okupiĝis ankaŭ pri la morfologio de la estona lingvo, ordigante sufiksojn, sed kreante ankaŭ novajn morfemojn. Laŭ la finna lingvo li enigis en la estonan lingvon sintetikan formon de la superlativo, li aldonis al parte deklina bl infinitivo novajn kazojn. En sintakso li batalis bonrezulte kontraŭ la troa germana influo en vortordo.

Kompreneble, Aavik havis entuziasmajn subtenantojn, precipe inter junaj verkistoj, sed ankaŭ furiozajn oponantojn. Tamen lia

**Ain Kaalep**

# **PRI CELKONSCIA MODIFADO DE LA ESTONA LINGVO**

**Prelego prezentita en la 28-aj Baltaj  
Esperanto-Tagoj en Tartu 1991**

Lingvistoj ofte neas eblon de arta lingvokreado. Ili asertas, ke t.n. "naturaj" (naciaj) lingvoj evoluas nur sen interveno de la konscia homa agado. Aliaj inter ili tamen ne ekskludas la rolon de la homa konscio en lingvoevoluiĝo. Kiel ekzemplon ili mencias, ekzemple, la estonan lingvon.

Ain Kaalep (n. 1926) estas estono, finno-ugra filologo, verkisto kaj poeto, literaturisto. De li aperis kelkaj poemkolektoj kaj teatraĵoj, tradukitaj verkoj el pli ol deko da lingvoj.

**J.O.**

Formiĝo de la nuntempaj skribaj lingvoj procedis diverse. Grandaj ŝanĝiĝoj ne okazis en tiuj lingvoj, kiuj ekzistadis kiel naciaj lingvoj jam en mezepoko. Tiuj popoloj, kies patriarka vivmaniero daŭris longe kaj kiuj longe konservis sian tradician kulturon, devis rapidi jam en la pasinta jarcento por atingi la popolojn avancintajn el la evoluo. Tion ankaŭ rilate la lingvon. Ŝanĝiĝo de la civilizacio kaŭze de la fariĝo de la vortprovizo: estis aperintaj multegaj novaj nocioj, la lingvo servanta tradician kulturon ne plu estis kapabla ilin esprimi.

El la pasintjarcentaj lingvonovigoj ni menciu ĉi tie tiujn celkonsciajn procezojn, kiuj okazis ekzemple en la greka, rumana kaj hungara lingvoj. Ili ĉiuj estis esence purismaj: vortojn por novaj nocioj oni trovis el la vortprovizo de sia propra lingvo, oni strebadis eviti pruntojn. Okaze de tio oni agadis kelkfoje – ekzemple en la hungara lingvo – rilate la bazan vortrezoron tre kuraĝe: la ekzistantajn vortradikojn oni amputis neglektante eĉ etimologiajn leĝojn.

En la estona lingvo la granda lingva novigo okazis en nia jarcento. Necesis rapidi eĉ pli ol en la ĵus menciitaj lingvoj, ĉar la procezo atingis dum la jaroj 1910–1920 vere revolucionan impeton, oni povas eĉ

# GEOGRAFIO DE ESPERANTUJO

## KOMI SSR

Komi SSR estas aŭtonoma respubliko (lastatempe deklarinta sian suverenecon) de finnugra popolo komi-oj en norda eŭropa parto de Rusio. La regiono spertis fortan utiligon de naturaj riĉaĵoj, plejparte de nafto, karbo kaj arbaroj, kiu kaŭzis grandan enmigradon tiel, ke komi-oj nuntempe estas minoritato de malpli ol 25 procentoj (en 1926 pli ol 90 procenta plimulto). Komio ankaŭ estis unu el la lokoj, kie troviĝis koncentrejoj dum la Stalina epoko kaj poste.

SYKTYVKAR. La unuan (en la lasta jartrideko) grupon de esperantistoj organizis Oleg Ŝtraler en 1974 inter universitataj studentoj. En 1975–1976 tiu grupo disfalis.

En 1982–83 O. Ŝtraler kaj S. Gamzin restarigadis Esperanto-movadon. En 1983 aperis Esperanto-klubo "Norda Stelo", registrita ĉe Asocio de sovetaj esperantistoj. En la unuaj du jaroj aktivis Je. Ŝibajeva (nun Ŝelest), F. Tazijeva, V. Zemcova, T. Petrusenko, T. Naljotova, L. Avdjuŝkina. En 1984–85 G. Oparina gvidis Esperanto-kursojn kaj oni elpendigis reklamajn afiŝojn en la urbo.

En 1985 Tazijeva gvidis kurson en syktyvkara norda suburbo Ejva, kaj Ŝibajeva kaj Petruŝenko du grupojn en la universitato. En 1986 F. Sagidullina gvidis kurson en biblioteko; al ŝi helpis Anatolij Sidorov. En 1987 A. Ostanin kaj Tazijeva gvidis kurson en metalista kulturdomo.

En 1988 Ostanin gvidis kurson en la metalista kulturdomo (ne tre sukcese: la kurson finis nur du lernintoj) kaj en Ejva instruis N. Savjolova. 1988 estis la jaro de "esperantista revolucio", la aktivuloj luktis por rajtoj de esperantistoj kaj por kuraĝigi sendadis mesaĝojn al la Esperanto-klubo de Sovetio. Tiam ankaŭ "Norda Stelo" ricevis proklamojn de Kauts, de Jegorovas. La 22-an de majo 1988 Anatolij Sidorov publikigis en junkomunista ĵurnalo "Molodjoj Severa" (Norda Junularo) artikolon "Ternistyj put" (Dornoplana vojo). En tiu jaro ĝi estis unu el la plej kuraĝaj kaj honestaj artikoloj pri la historio de la Esperanto-movado en USSR, kiuj aperis en oficiala sovetia gazetaro. Tiam A. Sidorov aliĝis al syktyvkara filio de asocio "Memorial", kiu esploris la stalinan subpremadon. Interalie la filiestro Revolt Pimenov (morta en decembro 1990) estis mem esperantisto kaj aktivis en 1956–57 en Leningrado kaj korespondis kun esperantistoj el Norvegio kaj Francio kaj kun SAT-membroj.

konsekvenca ekstremeco ŝanĝis senteble la ĝeneralan rilaton al la evoluigo de la estona lingvo.

Ekstre merithava evoluiganto de la estona lingvo Johannes Voldemar Veski (1873–1968), kiu deiris nur el la elementoj de la lingvo jam ekzistantaj kaj rilatis al la fantazio de Aavik malkonfide, tute neante artan kreadon de vortoj, montris kelkfoje ankaŭ en sia agado tian kuraĝon, kian oni ne eblas imagi sen la modelo de Aavik. Lia vortkreado apogis sin unuavice al dialektoj, sed li kuraĝis kelkfoje ŝoveti signifojn de vortoj kaj per sufiksoj krei tute novajn vortfamiliojn. Ekzemple el la dialekta vorto "sõltus" (pendmaŝeto de vestaĵo) li derivis abstraktan verbon "sõltuma" (dependi), de tio gravan politikan terminon "sõltumatus" (sendependeco) kaj tiel plu. En sufikskombinaĵoj li ofte estis eĉ pli kuraĝa ol Aavik.

Nuntempe la estona lingvo estas unu el la ĉiuflanke evoluintaj kulturlingvoj, en kiu eblas doni akademian klarecon en ĉiuj fakoj. Ĝi evoluis tia el la tradicia kamparana lingvo dum unu homgeneracio.

Sen la eksterordinara kuraĝo de lingvoevoluintoj tio apenaŭ eblus.

## LITERATURO EN RADIO

Pola Radio kadre de siaj E-elsendoj disaŭdigas ĉiusemajne 25-minutan literaturan programon, en kiu oni prezentas ĉefe la polan literaturon, sed ne mankas ankaŭ prezentoj de E-verkistoj. Inter ĉi-lastaj estis prezentitaj kune kun fragmentoj de verkoj: William Auld, Marjorie Boulton, István Nemere.

Apartan literaturan elsendaĵon, bele intermiksitan kun muziko oni dediĉis al la fama finna eposo "Kalevala" kun la substreko, ke ĝi ankoraŭ estas havebla ĉe Mendoservo. Ĉiu literatura programero estas aŭdigata dufoje, premiere ŝaŭdon je la 21.30 laŭ la universala tempo (i.a. per la meza ondo 200 m = 1503 kHz) kaj ripete dimanĉon je la 17.30 UT (i.a. 49 m = 6095 kHz). La detalan programfolion pri ĉiuj E-elsendoj de Pola Radio, inter kiuj troviĝas ĉiusemajne kulturmagazino kaj muzikmagazino, oni povas ricevi ĉe: Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Varsovio, Pollando.



de historia sekcio ĉe Tastagola Junulara Esperanto-Centro, membro de SAT kaj aktivulo de Movado por Unuigo; li disvastigas "Graŝdane Mira"-n (Civitanoj de la mondo) kaj verkis kelkajn artikolojn por "Samarano". La sekretariino de la klubo estas Faina Tazijeva, kiu respondecas pri la dokumentado kaj ankaŭ pri la poŝto de "Norda Stelo" kaj la instruisto estas Aleksej Ostanin. Inter aliaj klubanoj kaj eksterklubaj esperantistoj oni povas mencii pri Nina Savjolova, Nikolaj Sokolov (kluba fotisto), Vladislav Afanasjev (Konkordo), Gennadij Kodankov (La frataro de homoj), Jelena Ŝelest, Artur Artejev.

Poŝta adreso de la klubo: SU-167026, Komi SSR, Syktyvkar, a/k-1069, E-klubo Norda Stelo.

VORKUTA. En tiu dua granda komia urbo ekzistas Esperanto-klubo "Januaro" ekde 1988. La prezidantino estas Julija Dmitrijevskaja (169900 Vorkuta, Janovskogo 3a-29), kaj ŝi havas preskaŭ 10 membrojn. Antaŭ nelonge Vorkuta estis fama pro esperanto-poeto M. Bronŝtejn, la aŭtoro de popularaj E-kantoj "Zimbabve", "Novaj kondiĉoj" ktp., sed en 1990 li reloĝiĝis al Tiflvin. Vorkutanino S. Novruzova ankoraŭ 1989 partoprenis en Kaunas-a BET. Lastatempe la E-klubo malaktivigis.


USINSK estas malgranda kompakta urbeto, kaj kiam en 1985 Valentina kaj Viktor Zaĥarov aranĝis esperanto-kursojn, venis ĉ. 60 interesiĝantoj. Komence de 1986 aperis esperantoklubo "Radioj" (nuna nomo "Polusa Cirklo"). Nun la klubo havas 10 membrojn. La prezidantino estas Valentina Zaĥarova (169706 Usinsk, Ĉernova 4-11), siaj du filoj estas denaskaj esperantistoj. Polusa Cirklo nun estas la plej granda klubo en Komi-Esperantujo kaj aparte solide aspektas surfone de malgranda urbeto.

En urbo PEĈORA estas esperantisto: Aleksandr Anatoljeviĉ Trubarjov (169700 Peĉora-7, a. ja. 15). Estas unu komencanto en UHTA. Sovetia registaro uzas Komi-teritorion kvazaŭ prizonan kunĵetujon: tie funkcias ĉirkaŭ 80 prizonejoj-koncentrejoj. Inter la prizonuloj disvastigas Esperanton asocio "Konkordo" (lernantoj en punejoj Vetju, Kosju-Kojym ktp.). Membroj de "Konkordo" estas ankaŭ en Vygort, Pervomajskij kaj aliaj lokoj (plejparte invalidoj, lernintaj kelkajn lecionojn de Esperanto).

**Vladimir Romanov**

La teksto aperis en revueto "Samarano" n-ro 7/91 (87) en urbo Petrozavodsk, Karelio.

BARENCA MARO



En 1989–90 A. Ostanin instruis en la universitato (ekzameniĝis dum la du jaroj 6 kursanoj). Al la syktyvkara "Memorial" en printempo 1989 estis alveturinta akademiano A. Saĥarov. Inter lin renkontanta popolamaso staris ankaŭ esperantistoj: Anatolij Sidorov kaj Tatjana Naljotova. Kiam akademiano Saĥarov kun siaj korpogardistoj iris en Domon de Politika Klerigo tra studentoj kaj gapantoj, al li penetris Anatolij Sidorov por interesigi Saĥarov-on pri la sorto de reprezaliitaj esperantistoj kaj pri Esperanto. A. Sidorov enmanigis al la akademiano sian artikolon kaj lernolibron de Esperanto. (Antaŭ du jaroj tiel faris V. Kauts en Tallinn, trabatiginte al Miĥail Gorbaĉov, sed same senrezulte).

Nuntempe la maksimuma kvanto de klubanoj de "Norda Stelo" estas 10 personoj. Ekde 1984–1985 ĝi aranĝas ĉiujare vintrajn Komi Respublikajn Esperanto-Renkontiĝojn (KRER) kun 15–47 partoprenantoj, kaj somere boatadojn kun 10–18 partoprenantoj. Konstanta "patriarko" de la klubo estas malnova (de 1973) esperantisto Oleg Franceviĉ Ŝtraler (167026 Syktyvkar–26, Komsomolskij pr. 41–45). Kasisto kaj bibliotekisto estas Anatolij Sidorov (167031 Syktyvkar, Neveljskaja 53–6). Li estas kunordiganto



MAREK JELIŃSKI

**WA:** Ni opinias tion komploto de tiuj damnindaj angloj, kiuj ĵaluzas pri ni kaj nia nacia malavaro, kaj volas nin senvalorigi per elpensado de kompletaj malveraĵoj. Ekzemple, la anglo Sydney Smith (1771–1845) aplombe asertis: Por enirigi ŝercon trafe en la komprenon de skotoj, necesas ĥirurgia operacio. Tiu aserto estas komplete senfundamenta. Necesas nur kelkaj klarigoj.

**AP:** Ĉu skotoj priridas aŭ primokas per similaj ŝercoj alinacianojn?

**WA:** Nu jes, la anglojn kompreneble (venĝo estas dolĉa). Tio havas ankaŭ dimension politikan. Ekzemple: Motoro de aviadilo paneis kaj

## **...LA BONA DIO TIEL AMAS LA SKOTOJN...**

La varsovia neesperanta eldonejo "Interlibro" aperigis ĉi-aŭtune (1991) laŭvican ŝercokolekton de Andrzej Pettyn "Usmiech v szkocka krate" (Pri la skota humursento), kiu cetere aperos ankaŭ en Esperanto. Estas interese, ke ĉi tiun pollingvan libron antaŭas intervjuenkonduko kun la konata E-poeto William Auld el Skotlando, kies fragmenton ni publikigas en ĉi-tiu numero. La pollingva libro de Pettyn enhavas skottemajn karikaturojn, inter kiuj troviĝas la portreto de W. Auld farita de pola desegnisto Marek Jelinski.

**Andrzej Pettyn:** Vi estas skoto, do vi certe scias, ke tra la mondo cirkulas t.n. "skotaj ŝercoj". Kion pensas pri tio la skotoj mem? Ĉu ili koleriĝas?

**William Auld:** Jes, ni aŭdis pri tiu fenomeno. Ni ne koleriĝas, ni tutsimple miras, ke alilandanoj tiel funde miskomprenis nin. Jen okazaĵo, kiu klare pruvas la veran skotan sintenon al la mono.

Du skotaj terkulturistoj vizitis Aŭtomobilan Ekspozicion. Aĉetinte forportebajn porciojn da fiŝo kun frititaj terpomoj, ili manĝante aliris standon, kie estis eksponataj luksaj aŭtomobiloj de marko Rolls-Royce. Ili ekvidis tre allogan aŭtomobilon, kaj komencis traesplori ĝin tre detale (kiom da sakoj de terpomoj ĝi kapablas transporti, k.s.). Alkuras komizo.

**Komizo:** Ĉu vi serioze interesiĝas pri tiu ĉi modelo?

**Terkulturistoj:** Kiom kostas?

**Komizo:** 50 000 pundojn.

**La terkulturistoj rigardas unu la alian, poste diras :** Ni aĉetas du.

**Komizo:** Du?

**Terkulturistoj:** Kompreneble. Po unu.

**Komizo:** Dankegon, sinjoroj.

Unu el la terkulturistoj elprenas sian monujon. La alia tuj protestas: Ne, ne, homo. Estas mia vico. Vi ja pagis la manĝaĵon.

**AP:** Ĉu skotoj sentas sin lacaj pro la rakontado de ĉi-specaj ŝercoj?

**WA:** Ne, ni simple ne plu ridas, ĉar ni jam delonge aŭdis ĉiujn eblajn variantojn.

**AP:** Ĉu vi eble orientiĝas, de kie venas "skotaj ŝercoj", kie ili naskiĝas? Ĉu eble elpensas ilin la skotoj mem kaj cirkuligas tra la mondo? Aŭ eble la ŝercoj apartenas al la t.n. popola humuro, kiu iom post iom transformiĝas?

Vortludoj tre plaĉas al skotoj. Tre ofte okazas, ke virinoj interesiĝas, ĉu oni portas kalsonon sub la kilto, kaj demandas: "Kio estas wom (vestita) sub via kilto?" Oni indigne respondas: "Sinjorino, sub mia kilto nenio estas wom (eluzita)."

AP: Ĉu en Skotlando la vivo mem ekz. la soci-politika vivo, influas la naskiĝadon de ŝercoj?

WA: Jes. Ekzemple, en Skotlando ekzistas du vortoj, kiuj tradukiĝas per skota. Ili estas Scotch kaj Scots. Satirulo (kun serioza celo) atentigis, ke la formo Scotch aplikigas nur al aferoj aĉeteblaj, kiel viskio, tomatoj, ovoj kaj politikistoj.

AP: Ĉu el la cirkulantaj ŝercoj oni povas konkludi, kia estas la tipa (meza) skoto en la ĉiutaga vivo?

WA: Se juĝi laŭ la ŝercoj, tipa skoto estas malalta, agresema, amikeca (jes, samtempe), sprita, drinkema kaj sentimentala. Ekzistas kelkaj tiaj skotoj, tamen la plimulto el miaj konatuloj ne konformiĝas, aŭ konformiĝas nur sporade. La vere admirindaj skotoj estas skotinoj. Ial mi pensas pri tiu anglo, kiu vizitis Glasgovon je la unua fojo, komerce, kaj vane serĉadis la celatan firmaon, kies adreson li havis, sed la lokon ne trovis. Do li haltigis surstrate iun mezaĝulinon (ĉiuj skotinoj estas mezaĝulinoj) kaj demandis, kiel atingi la adreson. Ŝi povis doni al li iom komplikajn direktivojn, kaj per iom da klopodo li ja trovis sian celon. Ses monatojn poste li devis denove viziti Glasgovon kaj tiun firmaon, sed intertempe li forgesis la direktivojn kaj ne trovis la lokon. Do li haltigis mezaĝulinon kaj pridemandis sin. "Ho, filĉjo", ŝi ekkriis, "ĉu vi ankoraŭ ne trovis ĝin?"

AP: Oni diras, ke rido plilongigas la vivon, ĉu do la meza skoto vivas pli longe ol ekz. anglo aŭ franco aŭ germano? Kion diras pri tio la statistikoj?

WA: Statistike, angloj vivas du jarojn pli longe ol skotoj. Ni klarigas tion per la fakto, ke la bona Dio tiel amas la skotojn, ke Li volas havigi al ili du pliajn jarojn en la paradizo.

**Intervjuis Andrzej Pettyn**

la aviadilo komencis malaltiĝi. Fine la piloto konstatis: "Necesas malpezigi la maŝinon; iu devas sin oferi!" Stariĝis kimro, kriis "Mi oferas min pro Kimrujo", kaj elsaltis. Tamen tio ne sufiĉis. Stariĝis irlandano, kriis "Mi oferas min pro Irlando", kaj elsaltis. Kaj tamen tio ne sufiĉis. Stariĝis skoto, kriis "Mi oferas pro Skotlando", kaj elfetis anglon.

AP: Ĉarma venĝo, sed ĉu ekzistas en Skotlando (eble en skota literaturo?) iu homo, kiun oni povus nomi "patro de la skota humursento"?

WA: Serioze, jes. li nomiĝis Harry Lauder, kaj fine de la 19-a kaj komence de la 20-a jarcentoj li estis landkonata (eventuale mondkonata) kantisto kaj komedianto. Li vestis sin per karikaturo de la nacia kostumo kaj iĝis tiel populara (ĉefe pro siaj sentimentalaj kantoj, kiujn ĝis hodiaŭ konas ĉiu skoto parkere), ke multaj homoj en-kaj ekster-lande akceptis lin kiel la stereotipan skoton. Se li ne inventis, li certe popularigis ŝercojn pri la avarco de ... la homoj en la urbo Aberdeen. Tiaj estas la ŝercoj, kiajn hodiaŭ vi, alilandanoj atribuas al ĉiuj skotoj (per speco de ĝeneraligo). La influo de Harry Lauder estis ja grandega. Interese estas, ke li mem ricevis reputacion de avarulo, sed fakte li private kaj senreklame donacis grandajn sumojn al bonfaraj organizaĵoj.

AP: Kiaspecaj estas ŝercoj, kiujn oni rakontas en Skotlando? Pri kio?

WA: Tipa skota ŝerco emas esti iomete satira. Oni tre ŝatas renversi la evitendaĵojn. Tion enkapsuligas jena rakonto.

La putino Janjo loĝis tutsupre de sesetaĝa modesta apartamentaro, kie ne troviĝis lifto. Iun vesperon ŝi staras antaŭ la stratpordo serĉante klientojn. Preterpaŝas kolegino, kiu salutas: "Kia sukceso?". Janjo fanfaronas: "Hodiaŭ mi jam dudekfoje grimpis la ŝtuparon." "Ho, kara" diras la kolegino, "viaj kompatindaj piedoj!"

Kiel en multaj landoj la nacia religio ofte elvokas ŝercojn. Skotlando ĝis antaŭ ne longe "ĝuis" specon de tre puritana kalvinismo, kiu, kiel multaj totalismoj, vekis samtempe timon kaj malsategon. Pro tio la suba tradicia spritaĵo vekas aprobon de ĉiu skoto, kaj igis tradicia citaĵo, kiam io estas neevitebla.

Kaj ili mortis kaj trovis sin antaŭ trono de la Eternulo. Kaj la bona Dio verdiktis: "Dum via tera vivo vi mensogis, vi hipokritis, vi adultis, vi drinkis, vi ludis kartojn. Pro tio vi pasigos la eternecon suferante turmentojn en la infero." Kaj la mizeruloj vekriis: "Bona dio, ni ja ne sciis! Ni ja ne sciis!" Kaj la Eternulo el sia senfina kompatemo respondis: "Nu jam vi scias!"

grandaĝa. La alia – multe pli juna, sed laŭ la cifonaĵoj ambaŭ egalas. Oni ne scias, kial la pli olda diris du versojn en la germana lingvo:

*Du grenadistoj al Franci'*

*El kaptitec' rusa revenis.*

La kunkuranto nepetite daŭrigis:

*Ĝisiris ili ĝis Germani',*

*Kaj malesper' ilin prenis.*

– Vi konas Heine? miris la pli olda.

– Kiel do ne koni, sed la grenadistoj ci tie estas almenaŭ milo...

– Mi ne estas grenadisto. Mi estas hungara grafo Palfi. Kia estas via honora nomo kaj titolo?

– Mi estas sentitola kaj ankaŭ mia honornomo estas griza.<sup>1</sup>

Tiel komenciĝis mia amikeco kun grafo Palfi, kaj oni povas diri, ke nin interkonigis antaŭlonge mortinta poeto. La daŭrigo estis tia, ke oni sendis nin ambaŭ al la koncentrejo 053. Tie ni devis portadi laborojn. Ĉar ni similis laŭstature – ŝultro ĉe ŝultro. Poste ni, anstataŭ ĉevaloj, sammaniere tiris veturilon ŝarĝitan per laboroj kaj niaj lokoj apudis inter la timonoj.

Dividantoj inter si pecon de surogata pano amikiĝas pli facile ol tio okazus sur bulvaroj de Budapeŝto aŭ Parizo, kie oni devas observi la delikatan tonon. La grafo trafis en kaptitecon ĝuste en Parizo, puŝita en nigran automobilon, senkonsciigita per bato sur la kapon. Li konsciiĝis estante jam en Rusio, duonnuda, apude ĵetita ĉifona prizona vestaĵo. Li estis kondamnita je 25 jaroj pro tio, ke li fuĝis el la hejmlando. Sed kiel ne fuĝi, se el la kastelturo oni eksteren ĵetas antikvajn librojn. Se oni deŝiras la ledan bindaĵon de Julio Cezaro kaj per la ledon replandumas soldatajn botojn. Se la junaj kaj belaj hungaraj knabinoj komencas lerni la lingvon de la fremdaj liberigintoj ekde la vorto "laĵis" ...<sup>2</sup>

Nun ni portas la saman trabon, spertas la saman malfeliĉon kaj nin mordas la samaj cimoj, similaj al latunaj kvinkopekoj.

– En mia Hungario tia "viva mono" ne estas, ĉu en via Latvio ĝi estas?

– Eble jam komencas interniĝi ...

Sed nin ne plenigas malamo. Ni volas rehejniĝi. Mi – al mia Aluksne, kie jam fragoj ruĝiĝas. La grafo Palfi – al la bordo de Buda,

## Aleksandrs Pelecis

### En la komenco estis Heine

Aleksandrs Pelecis, latva poeto-verkisto, naskiĝis en 1920 en la distrikto Aluksne en malriĉula familio. 23 jarojn li devis pasigi en Siberio kiel malliberulo, partoprenante konstruadon de la fifama urbo Komsomolsk (ne konstruita de Komsomol-anoj (soveta komunista junulara organizo, kiel oni certigas). A. Pelecis estas aŭtoro de kelkaj poem-kaj prozlibroj.

En sia biografia rakonto li diras pri la rakonto "En la komenco estis Heine" jene:

*"Antaŭ multaj jaroj mi malpaciĝis kun la bandito Gigas-Wili. Oni nomis lin ankaŭ Ĝuĝasvili kaj ankoraŭ aliloke: La patro de la popoloj. Mi sukcesis – la bandito ne pereigis min kiel multajn milionojn. Mi devis 23 jarojn pasigi en Siberio. Tie mi laboris kaj kiel traboportanto kaj kiel ĉevalo. Mi portadis arbotrunkojn en tajgo – por unu trabo ses malliberuloj. Poste ni sesope sur sledo aŭ ĉarego trenis ses trabojn, kaj tion oni nomis raciigo. Mi partoprenis konstruadon de la urbo Komsomolsk, sed komsomolanoj tie ne estis. Tial mi volus, ke oni alinomu ĉi tiun urbon "Zakljuĉonnaja" (Malliberula). Tamen mi dubas, ke oni ĝin alinomos. La traceo de Tajŝet longas 300 kilometrojn. Sub ĉiu ŝpalo de la fervojo kuŝas tri miaj samsortanoj. Tie ni portis kaj trenis la arbotrunkojn por stacidomoj konstruataj en arkaike-rusa stilo. Okaze, se vi vojaĝos tie, admiru la rezulton de nia sklava laboro. Kiam oni permesis al ni ripozi, tiam ni libertage faris fosajon por la taluso de la fervojo Tajŝet-Bratsk permane, ĉar ĉu por tia laboro oni eluzu fosilojn."*

Tio okazis antaŭ la pordego de la redistribua koncentrejo en Tajŝet. Milo da malliberuloj estis sidigitaj en la printempa koto. La dorna pordego longdaŭre ne malfermiĝis. Spite al la printempo blovis glacimalvarma norda vento. Verŝajne oni atendis iun, kiu elnombros, kiom da transportitoj ĉi-foje estas por aranĝi kaj plusendi al la sklavejoj de la traceo.

Estis la jaro 1949. Jozefo la Terura ankoraŭ regis de Vladivostoko ĝis Berlino. Du homoj kaŭris apude. Unu – griztempia, altfrunta, jam



Alvenas la momento, kiam ni kunestas lastfoje. La grafo Palfi falis antaŭ la matena elkonduko al la laboro. La ostoj ne plu kapablis supren teni lian bravon kapon. Ni sidas en la koncentreja hospitalo sur la tabulkuŝejo de la mortanta amiko. Ni parolas pri la vivo. Ni skandas versojn el la Himno al ĝojo de Ŝiller [Schiller]:

*Brakumiĝu, milionoj!  
Kison al la tuta mond'!  
Bonas super stela rond'  
Patr' en ĉielregionoj.*

La versoj de Ŝiller estas la lastaj, kiujn la mortanto aŭdas. La okuloj restas apertaj. Por ke ne enfalu cimoj en iliajn fajretojn mi kun Ito San premfermas ilin. El tabulslaboj ni faras ĉerkon. Por ke Vasja ne plu profanu la asterojn, ni deŝiras ilin ĉiujn kaj submetas al la forpasinto anstataŭ segaĝ-kuseno. Enterigos lin aliaj. Kiam oni elportos la ĉerkon ekster la zonon, la deŝoranta gardisto, konforme al la reguloj, per peza larika klabo bategos la grafan frunton. Tio bezonatas, por ke la mortinto ne reviviĝu en la tombejo de malliberuloj kaj de tie ne foriru al Hungarlando, kiel tiuj grenadistoj de Heine al Franclando...

Poste la imperiestro Hirohito savis sian samurajon Ito San al Japanio. El nia "ĉevaltrio" restis mi sola. Kompreneble, oni liveris aliajn "ĉevalojn" sed mi sukcesis paroli kun tiuj ne pri Haijnrih Heine [Heinrich Heine] nek pri Fridrih Ŝiller [Friedrich Schiller]. Sole en songoj, kiuj aperas ankaŭ en infero, iam mi interparolos kun la grafo Palfi, kies frakasita kapo restis en la tombejo de malliberuloj sur la irizaj asteroj el Latvio.

**El la latva kaj germana  
tradukis A.E. Kubulnieks.**

Klarigoj:

- 1) La familinomo de la verkisto signifas grizulo.
- 2) el la rusa lingvo: kusiĝu.
- 3) Voroŝilov, la ĉefa strato de Aluksne, antaŭe Pils (Kastela)-strato. En 1989 oni renomis la Voroŝilov-straton je Pils-strato.

kie li havas la plej malgrandan palacon. Eble la barbaroj ankoraŭ ne trovis ĝin kaj ne prifekis. Li volas ankoraŭ vidi la plej junan filinon Sofian Dĵulian. La grafo havas entute tri filinojn, sed pri tiuj du li malpli ĉagreniĝas. Agata kaj Angelina sukcesis veni el Parizo al Anglio. Kun la nuraj vestaĵoj surmetitaj. Tie parencoj kaj bonaj homoj helpas. Sed la plej juna filino ĉagrenas lin. Ŝi spite rifuzis forlasi la malgrandan kastelon sur la bordo de Buda.

– Estos ja ĉio bone! – mi diras. Sed tio estas nuraj vortoj.

– Havu mi sufiĉe da forto por ne ekmanĝi fiŝostojn el balaafuĵo! – li aldonas. Tiel stranga estas la preĝo de tiu ĉi aristokrato en la kruda barako por sklavoj en Tajŝet.

Foje preskaŭ parenĉiĝis nin la morto. Rompiĝis la bremsobastono por la traboĉaro, kiun ni trenis. Ni sukcesis flankensalti, sed nia kamarado, japano Ito San, kiu iris meze inter la timonoj, trafis sub la ĉaron. Mi ne scias, de kie kreiĝis la forto, sed la kvin restintaj "ĉevaloj" demetis la ĉaron de Ito San. Estis rompitaĵoj sep ripoj de la japano, sed li transvivis. Nun mi estas invitita gastigi en du lokoj. La grafo Palfi atendas min en Hungario. Li promesis edzinigi al mi Dĵulian, malgraŭ ke mi ne apartenas al alta socia tavolo... Sed la japano Ito San volas, ke mi kun la hungaro vizitu lin en Jokohamo ..

Nokte kiam cimoj ne lasis nin dormi, ni rakontos unu al la alia pri niaj perditaj paradizoj. En la fabeloj Heine ne estas elŝirita el la ledaj kovriloj, Hiroŝimo ne estas detruita kaj en mia Aluksne la ĉefa strato ankoraŭ ne estas alinomita kaj ne portas la nomon de la ĉefa helpanto de la grandekzekutisto ..<sup>3</sup>

Miaj ekslernantinoj el Latvio sendis al mi semgrajnojn de floroj. La estraro estas korfavora – al ni estas permesita unu florbedo inter la fetoraj barakoj. Tie disfloras irize la asteroj de Latvio. La inspektisto Vasja, kiu permesis al ni ĉi lukson, ĉiun vesperon ŝiras tri plej belajn asterojn.

– Ĉiu sciu, kial mi permesis al vi ĉi tiun florbedon! Kial mi ĉiuvespere ŝiras precize tri plej abundajn florojn? Ne en ladskatolon mi metos ilin – al latrino mi iros ... Por mi la faŝistaj floroj nur por tia bezono uzendas ... – Tia estas la monologo de Vasja, kaj li mem estas tre kontenta pri sia spritaĵo. Sed ni fortunigas nin kaj en tri lingvoj diras unu vorton:

– Porko!

Vivu, el mara ŝaŭm' naskita,  
la dia Cipra Afrodita  
helpanta nin la noktan fridon  
toleri, kiam nin satir'  
arbaren kaptas, malgraŭ ve',  
sternas sur molan muskoliton  
kaj varmigas per fajra spir'.  
Vivu La Cipra! Evoe!  
Faŭno! Zefiro kornon blovas,  
tiklan venteton li ekmovas.  
Venu al ni! L' arbaro dancas,  
tuta ĉielo dancbalancas.  
Vidu! Siluro el rivero  
emerĝis, la cilion hirte  
levis, kiel ĉasistan sagon  
kaj en la akvo dancas flirte!  
Rigardu, kia ŝaumapero!  
Ju-ha! Jam birdoj en proksimo  
flugilojn je la takt' eksvingas,  
anaso-vic', en ŝpruc' de slimo,  
el nuboj bordon jam atingas.  
Venu al ni! Ĝuu la tagon!  
Vi amas nian korpon blankan  
kaj belon de l' pied' senmanka!  
Nimfojn kaj dancon kreis di'! ...

Kaj – kiel meva aro zuma  
kun flugilaro blankepluma –  
kuras la nimfosvarm' al li.

Sed jen subite la rigardo  
de Faŭn' eksparkis per rigor'.  
kaj, hufofrapante, kun ardo  
ekkritis li kolere: "FOR!!  
Man' mia kiel glavo akras!

**Kazimjeĵ Tetmajer**

## **FRENEZA FAŬNO**

*Elkuris Faŭno en frenez'  
sur kampon, kaj en rondomez'  
de la dancanta Nimfa aro  
desur la kapo ŝiris for,  
plektitan el la junka flor',  
ornaman kronon de l' hararo,  
ĝin per dissema, ĉifa jet'  
surteren sternis kun impet'.*

*Kaj, en oreska nub' polena  
dronante per pied' flugema,  
kun sveltaj gamboj, kiuj flamis,  
l' siringaromaj Nimfoj klamis:  
"freneza Faŭno! Faŭno fola!"  
Kaj floroj mil el manoj junaj  
ekflugis al la vir' izola  
kiu, ĉe helaj korpoj, bruna,  
similis al rufa okzalo  
ĉe pure blanka liliaro.*

*"Venu ja, – ili krits – dia  
ekscit' el nia korp' radias!  
Vivu la di' laŭ kies volo  
ni nutras nin per vingrapolo!  
Vivu Pan', kiu per flut' kana  
paŝtiston brunan akompanas,  
kaj lin, en timo, per ridego  
postkuras en tondranta eĥo  
ĝis tiu, sen vip', sen fromaĝo,  
panike kuras al vilaĝo!*

soproprenajn sonĝojn lasis,  
vin mi deziras ami. Tage  
kaj nokte mi kuradis vage  
serĉante vin tra l' tero tuta;  
nek peno venki min sukcesis,  
nek pro la tim' mi serĉi ĉesis,  
sed spuron de via gracia,  
blanka piedo nur en miaj  
sonĝoj mi vidis ... "Faŭno fola" –  
la Nimfa voĉo persekuta  
el la arbaroj, boskoj, grotoj  
min loge vokas je dorlotoj,  
sed se mi cedas al la log',  
ekregas min kolero bola  
kaj, reziste je ĝu-provok',  
mi ree en la kur' rapidas  
kaj serĉas vin, postsekvas vin,  
sed vi eskapas kaj plu distas,  
do nur en sonĝoj mi vin vidas ...  
Sed tamen, tamen vi ekzistas!  
Inter la nomoj via nomo  
al flor' similas, se ĝin homo  
aŭ dio frustras, en fascin'  
li ŝvebas per animo sia  
al mond' supera, tutalia,  
en la okul' aperas heloj  
kvazaŭ li aŭdus melodiojn  
venantajn el ĉielsilento,  
el foraj sonĝo-galasaksioj,  
el miriadoj de la steloj  
sparkantaj en la firmamento ...  
Psiĥe, vi estas do! El tuloj  
lilkoloraj de nebuloj  
naskita supre de montaro  
en horo, kiam suno svenis,

Foren, vi nudulina greg'!  
Sufiĉe longe jam vi sakras:  
"freneza Faŭno!" Kia blek'!  
For!"

Nimfoj fuĝis ... Nun li sola  
restis, kaj la silent' konsola  
sur lin descendis dum suspiro  
de l' vento, softa floroŝpiro  
kaj akvoplor' ... Nur ie, sorĉe,  
ĉe rokoj de la for' marmeza  
Sirena kanto sonis dolĉe ...  
Ho vir' kaverna! Faŭn' freneza!  
Ĉasanto de gamboj graciaj!  
Ĉu kant' Sirena vin kortuŝis?  
Aŭ ĉu elfora vento duŝis  
per fridaj akvogutoj vin?  
Ĉu larmoj en okuloj viaj?  
Kaj Faŭno preĝis arde plej:  
"Ho helefrunta Sinjorin'  
de l' roso sur la erikej',  
de la vitreskaj lumoj dancaj  
sur ondoj sub nebul' matena,  
de la koloroj ornuancaj  
per kiuj brilas maro flua  
al softa nokto ombroplena,  
de la trankvilaj tagoj bluaj  
kaj vibroj de l' ĉiel' lazura,  
vi, inter puraj la plej pura,  
naskita el la roza spiro,  
el lilibriloj kiuj lumas  
kaj en la temp' de sunsubiro  
la suprojn de l' montoj orumas,  
vi, kiu unufoje nur  
la vojojn de ĉi mond' trapasis,  
sed por la hom' sur via spur'

Ne scias vi pri noktoj ombraj,  
klam mi, apud maro sombra,  
vin serĉis kun ardanta sino,  
preskaŭ mortante pro sopir' ...  
Ne scias vi, ke en krepusko  
post rozarbedo, en embusko  
halte, kun retenata spir'  
mi vin atendis eltronton  
el la rozar' ... Ne konas vi  
la tagojn, kiam mi vln revis  
al mia brusto aflugontan  
el la aŭror' ... Tiam mi levis  
la brakojn al la sunradi' -- --  
plaŭdetis mar', arbedo floris,  
ardanta sunodisko oris,  
kaj el levitaj miaj manoj  
al koro fluis sang' amara,  
por ke l' deziro temerara  
kaj la sopir' ne ĉesu glimi ...  
Ĉu do neniam? Ĉu neniam? ...  
El la ĉiel', el oceanoj  
ne venos vi al mi proksimi?  
Ĉu vanas mia serĉa vago  
kaj dezirego? Do al mi jam  
ekflugu fulme Zeŭsa sago,  
alportu ĝi la anestezon,  
detruu revon kaj frenezon,  
ke ĉesu jam la sonĝo bela ..."  
Kaj ĉu miraklo elĉiela?  
Vidu! El torso vilahara,  
kapra pledo, kaj statur'  
- kiu deziron je orgi'  
verŝis en sangon de arbara  
Nimfar' avida je plezur' -  
elradligas hela di' ...

vi, kiu foje teren venis  
donaci songojn al homaro ...  
Vi ja ekzistas! Aŭ ĉu vana  
estas la serĉo? Ĉu elana  
sopiro mia estas duba?  
Sencele mi al ombro nuba  
okulojn streĉas, por rekoni  
vizaĝon vian en subito,  
aŭroron de viaj pupiloj  
kun plenador' spektante, droni  
en la abismon de jarmiloj?  
Ĉu vane la ravegan miton  
pri vi deziras mi korpigi  
kaj kun la viva karn' min ligi?  
Vi fuĝas! Ŝajnas fojmomente  
ke robo ekflirtis arĝente ...  
Tiam mi kuras en profundon  
de l' mondoj, kaj mi vidas marojn  
de mar' naskitajn, kaj nubarojn  
fluantajn el nubarinundo,  
kaj montojn kreskintajn sur montoj,  
sed vi eskapis ... Tamen via  
esto ne estas iluzia!  
Vi ja ekzistas! Se mi foje  
povus vin vidi, spiri ĝoje  
per via spir', al via belo  
preĝi kiel al sun' aŭ stelo!  
Vin – helan adori, libera  
de vanto kaj avido tera!  
Sed timas vi ..  
Vilul' ĉi tia,  
ĉasanto de Nimfaro nuda,  
trinkanta ĝuon el iliaj  
korpoj, kiel el boulo vinon,  
timigas vin per korpo kruda ...



# POLA KOMPONISTO PRI "PERSONE"

Dum mia vizito en Svedujo mi renkontiĝis kun anoj de la muzikgrupo "Persone" kaj mi venis al la ideo, ke estus bone dediĉi al ĉi tiu interesa laŭ mi grupo iom da atento. Tial mi decidis intervjui junan polan muzikiston Piotr Rubik pri la kasedo de "Persone" titolita "62 minutoj". Apud la serioza muziko li interesiĝas pri distra muziko kaj en ĉi tiu sfero li havas kelkajn atingojn. Liaj komponaĵoj estas ofte prezentitaj en Pola Radio kaj Televido:

- Diru al niaj legantoj, kion vi ĝenerale opinias pri la kantado en Esperanto?

- Laŭ mi estas bonege, ke oni uzas Esperanton por kantado. Tio povas esti aparte grava por homoj junaj, por kiuj iafoje kanto en Esperanto povas esti mezurilo de la valoro de la lingvo mem. Nu, mi ne rakontos pri tio, ke kanto en Esperanto povus ankoraŭ pli proksimiĝi junajn diverslandanojn, tio estas afero evidenta. Ŝajnas al mi, ke - kompare kun literaturo, precipe poezio - muziko ankoraŭ ne estas plene ĝuste taksata, se temas pri la plenumado en Esperanto. Mi mem sentas mankon de aranĝoj, en kiuj junaj homoj el diversaj landoj povus neesperantistoj por tiamaniere montri la kant-valoron de la internacia lingvo al eksteruloj. Mi mem gvidis antaŭ du jaroj internacian kurson pri Esperanto-kantoj kadre de la bone konata feriado en Miedzygorze.

- Kiel estis akceptita via kurso?

- Mi devas konfesi, ke mi estis surprizita. Mi ne supozis, ke ekzistas tiom da kanto-ŝatantoj en la E-movado. Se ne ekzistus limigita kurso-kadro, versaĵne ili emus kanti la tutan tagon...

- Jes, mi mem spertis, ke inter esperantistoj estas multaj kanto-ŝatantoj, sed estas tro malmulte da kantaroj, mankas repertuaro facile kantebla, populara...

- Nu, jes, vi pravas, mankas nova repertuaro, ĉar iafoje estas akireblaj malnovaj kantlibroj, sed homoj ŝatus kanti ĉiam pli novan repertuaron. Cetere repertuaro estas afero diskutinda...

- Jes, ĝuste...

- ...ĝuste! Mi iom pensis pri tio aŭskultante la kasedon el Svedujo, la kasedon de la grupo "Persone". Unuaflanke, ni en nia kantkurso, kantis malnovajn kantojn, malnovajn furorkanzonojn, mondkonatajn. Sed ja ekzistas ebleco, kaj la grupo "Persone" klare montras tion, krei originalan repertuaron en Esperanto. Mi pensas, ke tio estas tre mobiliza, tiu komponado de originaj kantoj speciale por esperantistoj. Sed revenante al la kasedo de "Persone". Mi auskultis ĝin tre atente.

Jam lipoj ekridetas die,  
en la okulaj sparkas lum',  
flugila nevidebla plum'  
ĉe ŝultroj tremas afonie,<sup>2</sup>  
la puls' de lia sango bola  
kunritmas kun muziko sfera  
- la malpuraĵ' kaj peko tera  
defalis desur Faŭno fola ...  
Mirakla fort' diigas lin ..  
Li dias, dias! En fascin'  
kun brustostreĉ', levitamane,  
l' mondon rigardas li elane.  
L' antaŭa mond' fallis rumore,  
jam nova evoluas flore ...  
La nova viv'! Laŭ dia graco  
Glorkant' aŭroras en la spaco;  
nekomprenebla, rava belo  
ornamente fluas al la tero,  
el trans montetoj, kiuj bluas  
en la nebulo-roboj, fluas  
sur lumherbejon senflugila,  
duonekarna, duonbrila,  
anima duonsonĝa rot'.  
La vent' disblovis kapran felon,  
Faŭn', kiel di', radias helon.  
Kaj tiam frapis lin la mort'.

tradukis:

**Kazimjeĵ Ŝĉurek**

**Klarigoj:**

- 1) Ju-ha! - ekscita, stimula ekkrio
- 2) afonie - ĉi tie uzita en la senco "silente", "senvoĉe"

# Pola prezidento en ŝercoj kaj anekdotoj

## 1

Tio okazis ankoraŭ en la tempo, kiam Lech estis lerneĵano. Kune kun siaj samklasanoj li vizitas muzeon. En tiu momento li sidiĝis sur la plej bela seĝo de la muzeo, kiu estis unu el la eksponaĵoj.

- Knabo!!! Kion vi faris? - ekkritis la koleriĝinta guidantino - tio estas seĝo de Ludoviko la XIV! Oni ne rajtas sidiĝi sur ĝi!!!
- La seĝo estis libera - do mi sidiĝis - respondis ĝentile Lech
- kiam Ludoviko revenos, mi levigos kaj liberigos la seĝon...

## 2

Sinjorino Danuta Walesa sin turnas al la edzo per la vortoj:

- Iam vi nomis min reĝino... Kaj hodiaŭ?
- Nu, kara mia! - indigniĝis Lech - en la tempo de demokratio?

## 3

La gazetara konferenco de Lech Walesa, venas demando:

- Ĉu via filo - demandas unu el la ĵurnalistoj - edziĝis pro amo aŭ pro mono?
- Nu, kiel mi diru al vi tute simple - pripensas Walesa - pro la amo al la mono...!

## 4

Walesa hazarde renkontas la laman ministron pri informado Jerzy Urban kaj tuj alparolas lin:

- Mi aŭdis, sinjoro, ke vi tute bele draŝas min diversmaniere - diras Walesa - en viaj ŝercoj mi estas plena idioto!
- Tio ne estas ŝerco - respondas Urban - mi diris ĉi tion tute serioze.
- Nu, do vi estas bonŝanca - diras trankviliĝita Walesa mi ne ŝatas stultajn ŝercojn!

Kompreneble post tia aŭskultado estas malfacile priparoli ĉiun muzikpecon aparte.

– La unua komponaĵo en la kasedo estas "De l' praa tempo ĝis la nun". Kion vi opinias aŭdinte ĝin?

– Kompreneble, mi konscias, ke ĉi tio estas amatora muzikgrupo. Sed, se konsideri, ke ĝi estas amatora, neprofesia muzikgrupo, la anoj de la grupo ludas pli bone ol la plejmulto de la polaj amatoraj rokmuzikaj grupoj. Eble tio estas merito de la muzikiloj. Malgraŭ tio mi volus atentigi pri mankoj, precipe rilate al la muzika prilaboro.

Mi sentas monotonecon ĉe la aranĝo de kalkaj muzikverkoj. La ĉiama elprofitado de la samaj muzikiloj kaj donado de la sama tasko en kelkaj laŭvicaj muzikverkoj ne estas bona ideo. Ĉiu muzikverko devus surprizi la aŭskultanton per iaj novaj efektoj sonaj. Se oni jam enkondukas saksofonon, tiam oni devus doni al ĝi pli respondecajn taskojn, ne nur daŭrigadon de longaj muziknotoj, la solpartoj devus esti pli viglaj, atingi altajn sonregistrojn. Oni devus ankaŭ atenti pri la agordigo de la gitaroj kun la saksofono, la perkutisto devus pli variigisian ludon, precipe rilate al la pasoj (t.n. break-oj). Nu, kaj kompreneble la kantisto devus atenti pri tio, en kiu registro estas al li pli oportune kanti, ĉar ia foje dum la supreniro lia voĉo simple rompiĝas.

– Kion vi dirus, ekzemple, pri la komponaĵo titolita "Tute sekura"?

– La komponaĵo "Tute sekura" – estas laŭ mi – tute interesa. Rimarkindaj estas la harmonikaj ideoj. Oni vidas, ke la gitaristo pli bone primajstras la solpartojn ol la saksofonisto. En ĉi tiu komponaĵo ankaŭ la kantoplenumo estas multe pli bona. Tute bele eniras la koruseto... Mi ĝojas, ke la perkutisto enkondukas en sian repertuaron sonojn de novaj muzikiloj kaj iom variigis la stilon de la ludo.

– Piotr, ŝajnas al mi, ke aparte plaĉis al vi la kanto "Eĉ knaboj, ĉu ne?"

– Jes, la komponaĵo "Eĉ knaboj" estas laŭ mi unu el la plej interesaj muzikverkoj de la kasedo "62 minutoj". Finfine interesaj aranĝo-ideoj, ŝanĝo de la sonado de la sol-gitaro, de la bas-gitaro, interesa harmonio, stilizado je "ragtime", la perkutisto rememoris, ke ekzistas "balailitoj", pro kio li meritas laŭdon. Sed la tuta plenumo ne estas ankoraŭ plene kontentiga, en ĝi enestas tro multe da falsoj kaj malglataĵoj. Eble la saksofonisto sentos koleron al mi, sed mi opinias, ke sian parton li estus povinta ludi per pli bela sono. Ŝajnas, ke en la komenco en la melodio de la saksofono aŭdeblas muziknoto de konata lulkanto. Mi tamen volas por la fino substreki, ke la grupo "Persone" faris bonan komencon, kaj se la anoj de la grupo iom laboros pri si mem, ili certe atingos bonajn rezultojn! Karaj svedaj geamikoj, mi deziras al vi ĉi tion tutkore!

**Intervjuls: Andrzej Pettyn**

*Ekregis profunda silento. Post kelka tempo aŭdiĝis la voĉo de ĉefanĝelo:*

*- Anoncu vin en la purgatorio! Ili bezonas tie elektriston!*

8

*Pollando de la 1990-a jaro...*

*Mi malfermas gazeton - Walesa.*

*Mi enŝaltas televidilon - Walesa.*

*Mi ekrigardas tra la fenestro - Walesa.*

*... kaj mi timas malfermi ladskatolan konservafon!*

9

*Walesa iras tra ludoplaco de infanoj. Li alparolas knabinecon, kiu biciklas:*

*- Ĉu tio estas via biciklo?*

*- Jes - respondas la knabino.*

*- Kaj via patro posedas aŭtomobilon, ĉu ne? - li demandas plue.*

*- Kompreneble! - diras la knabino - Polonezon!*

*- Diru al mi ankoraŭ, ĉu vi havas hejme kolortelevidilon?*

*- Kompreneble!*

*- Nu, vidu - Walesa glatumas la kapon de la knabino - tio estas mia merito...*

*La knabino turnas sin direkte al la virino sidanta sur la proksima benko.*

*- Panjo, panjo!!! Onklo Helmut el Munkeno alvenis!*

10

*Vendejon de nutrovaroj eniras maljunulino. Proksimiĝas vendistino kaj la maljunulino demandas:*

*- Ĉu troviĝas ĉe vi plengrasa kazeo?*

*- Avinjo - ridetas la vendistino dirante - plengrasa en Pollando estas nur la prezidento ...*

**Kolektis kaj tradukis**

**Andrzej Pettyn**

Walesa troviĝas en eksterordinare luksa restoracio dum bankedo fermanta unu el la eksterlandaj vojaĝoj.

– Kion vi deziras? – demandas servoprete iu kelnero.

– Kion ajn! – diras iom neglekte Walesa – La prezo tute ne gravas!

– Do, eble vi deziras kaviaron? – demandas la kelnero.

– Kaj kion oni povas ricevi tuj?

– La ovojn sturgo! – respondas la kelnero.

– La ovojn de sturgo! – diris servoprete la kelnero.

– Bonege – ĝoje frotas la manojn Walesa – mi petas du malmole kuiritajn!

Lech Walesa komencis la fiŝkaptadon, kiun li ege ŝatas. Tute hazarde li hokis oran fiŝeton.

– Liberigu min! – bona homo – petegas la fiŝeto. – Mi plenumos ĉiujn viajn dezirojn!

– Sincere dirite, mi havas nur unu deziron! – diras Walesa – Mi jam estas sufiĉe maljuna, mi jam volus finfine ripozi en iu bonkvalita Domo de Maljunula Prizorgo.

– Via deziro estas por mi ordono! – respondis la fiŝeto.

Ĉirkaŭe ĉio ekzumis, ekbrilis, ekĝemis la tero – kaj Lech eĉ ne sukcesis pripensi la aferon, kaj li tuj eniris Kremlon ...

Pasis jarcento. Kaj jen en la ĉielo aperis la tempo kiam oni komencis aprobi novajn sanktulojn. Antaŭ la ĉiela pordego kreiĝis longega atendovico. Je ĉe la fino de la atendovico staras Walesa, antaŭ li Patrino Tereza el Kalkuto.

Aŭdeblas trumpeado, aŭdeblas la voĉo de anĝelo:

– Andrej Saŝarov! Patrino Tereza! Proksimiĝu! Vi estas akceptitaj! La ceteraj personoj povas anonci sin ĉe ni post cent jaroj!

– Kaj mi?! krias Walesa alkurinte al la pordo – Kiu liberigis Eŭropon de komunismo?! Kiu dum la tuta vivo portis ĉe la vestaĵo la insignon de Dipatrino?! Do?!!

senarmitaj,  
enterigas sen la salvoj  
de la lasta honorsigno.  
Ventopuŝoj preme kreskas,  
skuas l' arbojn de l' tombejo  
kaj impete  
kaptas l' altan  
sveltan supron de piceo,  
kiel kenon ĝin derompas,  
ĵetas,  
krucojn frakasante,  
tutproksime  
de l' staranta homamaso  
timiginta.

Kun terur' la funebrantoj  
hastas,  
sen rigardi posten,  
al pordeg' de l' kvietejo,  
malaperas en tenebro  
de la frua vesperhoru ...

Stride siblas sturma vento,  
taŭzas la malhelajn nubojn.  
Jam scintilas surĉele  
steloj foraj, senpastaj;  
ekvidiĝas  
tra l' branĉaro ventskuata  
luna arko flavradla,  
kaj ekdancas  
sur la tomboj  
palaj ombroj de l' mortintoj  
salutantaj  
l' alvenintojn.

1991 01 22-25

Arturs Edgars Kubulnieks

## SEPULTO

Vents fino  
por la vivoj,  
kiuj flamis en l' espero  
trovi vojon al la lumo.  
Vintra vento vindas fere  
fortojn de la funebrantoj.  
Flugas flockoj folleske,  
dampas sonojn  
de la kanto ekmutanta  
sur la lipoj treme feblaj,  
klam tristo korojn ŝiras.  
Veoj vunde volon vringas.  
Lasas fingroj  
florojn fall  
en la fridan tomo-kavon.  
Vento vintra  
viŝas larmojn  
de la vangoj;  
kaj la sepultantoj ŝutas sablon,  
tri plenmanojn,  
en la kavon adlaŭe.  
Per fosiloj  
la tombistoj eklaboras.  
Tondras ŝtonetaro  
albatigē al la ĉerkoj.  
Jam formiĝas la tumulo,  
tegas ĝin floraroj, kronoj,  
kaj en ili siblas vento,  
pelas tra l' tombejo neĝon,  
omaĝante  
al la viroj,  
kiuj falls



**Kazimjeŝ Ŝĉurek**

**PENETRE TRA JARCENTOJ**

Kolekto de diraĵoj, interesaj eventoj, anekdotoj kaj ŝercaĵoj, kolektitaj el diversaj fontoj dum daŭro de 30 jaroj.

68 paĝoj, 16,- gld.

Eldonis Oy Mendoservo Ak 1991

**Johan Hammond Rosbach**

**SILKA KUSENO**

Novelaro de nia fama norvega aŭtoro, verkita originale en Esperanto.

63 paĝoj, 16,50 gld.

Eldonis Oy Mendoservo Ak 1991

Norda Prismo

Kultura revuo pri Nordio en Esperanto

ISSN: 0789-9483

Aperas kvarfoje jare.

Eldonanto: Oy Mendoservo Ak, Kivistöntie, 05510 Hyvinkää

Redaktanto: Jukka Pietiläinen, Puutarhakatu 12 B 18, 40200

Jyväskylä, Finnlando.

Kunredaktantoj kaj kunlaborantoj: Jaan Ojalo, Andrzej Pettyn,

Artur Kubulnieks, serĉataj.

Kompostas: Merike Pinn

Presas: Eesti Põllumajandusülikooli trükikoda.

Perantoj kaj kotizoj:

Oy Mendoservo, Kivistöntie, 05510 Hyvinkää, Finnlando,

poŝtĝirkonto 427 722.

Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176,

NL- 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

48 FIM

24 NLG